

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №6



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №6 (296)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 75-76.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №6 (296).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 3 июня 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Intervjuo	5
Duncan Charters: Kapabla en komunikado (Intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski).....	6
Fernando Maia Jr.: Entuziasma laboranto (Intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski).....	14
Eventoj	18
So Jinsu. La naŭa Azia-Oceania kongreso en Danang	19
Ángel Arquillos. Malago: La triopa kongreso	21
Vytautas Šilas. Ankoraŭ ne lasta	23
Junaj esperantistoj grave rolis en UN-kunsido	25
Ralf Haumer. Sunplena kaj bonetosa Printempa Semajno.....	26
Ronald Schindler. Ponta festo kaj fulma kurso en Frankfurto ĉe Odro.....	28
Irina Gonĉarova. Lingvotrejnado en Jekaterinburgo: Nove kaj denove	29
Tim Gee. PER2019: Printempe en Norda Karolino	30
Fritz Wollenberg. Venu aŭguste al Berlino por jubileo de Zamenhofparko	32
Balotado pri Komitatanoj B komencita	33
Dmitrij Ŝevĉenko prelegos en BET-55	34
Paulina Jaworska. Esperanto sur la strando – 2019.....	34
Koncize (8 informoj).....	35
Nekrologe	35
Tribuno	36
Elisabeth Schwarzer, Pascal Dubourg Glatigny. Berlinanoj proponas	37
Ian Fantom. Ĉu iu aŭskultas?.....	38
Esperanto.net.....	40
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj	41
Arkivo	42
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en junio 2019	49
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>La Ondo</i> survoje al N ^o 300	44
Sep demandoj al Tālis Bērcis (Intervjuo de Aleksander Korĵenkov).....	51

Nikolai Lozgaĉev. Poemoj de Vladimir Vysockij	53
Vladimir Vysockij. Kanto pri Rusio. Ne ŝatas mi (Tradukis el la rusa Nikolai Lozgaĉev)	54
Joseph Delpino. Miksitaj impresoj	56

Kulturo 57

Aleksander Korĵenkov. <i>Peterburgo</i> , ĉu nekomprenebla, sed bela?	58
Andrej Belyj. Peterburgo: Fragmentoj (Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov).....	59
Stanislao Belov. Ĉarma amatoraĵo (Recenzo: <i>Ĉiutaga vivo tra la mondo</i>).	70
Ricevitaj gazetoj	71
Ora jubileo de "La Patrolo" celebrite en Bolonjo.	72

Mozaiko 73

István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.	74
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	75
Reklamo	77

La Azia-Oceania Kongreso de Esperanto, okazinta kun granda sukceso ĉi-prin-tempe en Vjetnamio, lasis ne nur efemerajn spurojn en sablo, faritajn dum vespera promenado, sed ankaŭ neforviŝeblajn spurojn en la memoro de la partoprenintoj. (Kovropaĝa foto: So Jinsu)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Intervjuo



**104-a Universala
Kongreso de
ESPERANTO**

**20 - 27 julio 2019
Lahtio, Finnlando**

Baldaŭ en Lahtio kunvenos la nova Komitato de UEA. Inter ĝiaj taskoj estos elekto de la novaj Estraro kaj Prezidanto de la Asocio. Estas du kandidatoj por la prezidanteco: Duncan Charters kaj Fernando Maia Jr. Legu iliajn respondojn al niaj demandoj, decidu, kies ideoj ŝajnas al vi preferendaj por elkrizigo kaj progresigo de UEA, kaj, se vi estas membro de UEA, sciigu al via landa komitatano, kiun el la du vi ŝatus vidi kiel la gvidanton de la monda Esperanto-movado. Instigu viajn samlandanojn fari same.

Duncan Charters: Kapabla en kunlaborado



Kial vi decidis kandidati?

Ĉefe ĉar mi deziras servi la Asocion. En alia intervjuo mi parolis pri la signifo de la familio kiun reprezentas UEA, kaj la idealo de Esperanto restas daŭre freŝa kaj inspira pro la vivriĉiĝo kiun mi spertis per ĝi. Se mi povas helpi per mia movada kaj administra sperto progresigi la Asocion por ke ĝi povu diskonigi la valoron kaj utilon de Esperanto al ĉiam pli vasta publiko, mi volonte akceptos.

Antaŭ pli ol dudek jaroj, la tiama estro de la Elekta Komisiono de UEA petis min kandidatiĝi por prezidanto post kiam mi plurjare servis unue kiel prezidanto de la Asocio de Amerikaj Instruistoj de Esperanto (AAIE), kaj poste kiel prezidanto de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), nun Esperanto-USA. Mi ne atendis ke oni taksis mian prezidaton sufiĉe valora por meriti tiun proponon. Tamen tiumomente ankaŭ malhelpis min akcepti la ideon la respondecoj al mia profesia laboro kaj al mia familio. Mi konkludis ke ne estus juste, nek al ili nek al UEA, tiam akcepti la inviton. Familiaj bezonoj jam malhelpis al mi en tiu epoko ĉeesti ĉiujare internaciajn kongresojn.

Tamen koincide kun la nova peto ke mi konsideru kandidati, mi ĵus finis periodon de intensa instrua kaj administra laboro, kaj de nun instruos normale du aŭ tri universitatajn klasojn kaj rajtas peti forpermeson kiam necesos aŭ kiam mi deziros. Pro normala evoluo de la familia situacio, en la lastaj jaroj mi regule ĉeestadis kaj la U.K. kaj la Kongresojn de ILEI, kaj ĝojas pri la daŭra subteno de mia edzino, Cecily Lee. Ŝi aktive partoprenas tiujn kongresojn kaj jam publike prezentis kun mi al la Internacia Kongresa Universitato pri la temo de sia doktoriĝa tezo, la instruado de interkultura kompetento. Do mi sentas min pli libera kaj hejme apogita, kaj se mi estos elektita, povos fine nun dediĉi regulan tempon al la postuloj de la ofico.

Pri kio vi okupiĝas nuntempe en Esperantujo?

Loke, mi estas aktiva membro de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso en la ŝtato Misurio, apud mia hejmvilaĝo Elsah en Ilinojso, loko de ĉiujara pikniko al kiu mi invitas la esperantistojn kaj interesitojn. Tio signifas ke mi subtenas ĉiumonate kiam mi povas ĝian Konversacian Rondon (KoRo) kaj kunvenojn, kie mi sufiĉe ofte prezentas kaj gvidas ilin pri lingvaj, movadaj kaj mondaj temoj. Lastatempe mi respondecis pri la varbado de nova kaj nun regule ĉeestanta membro kiu montriĝis unue en mia poŝtelefono tra *Amikumu*, kaj mi vizitis alian universitaton por subteni

novan Esperanto-grupon de profesoro kiu interesiĝis pere de *Duolingo*. Do mi konstatas la gravecon de nia subteno kaj ekspluatado de la novaj fluoj en mondatiga teknologio. Mi partoprenas en la kongresoj de Esperanto-USA, kaj dum lastatempaj forpermesoj (sabatjara kaj persona) mi multe aktivis por Esperanto. Mi instruas Esperanton en mia propra universitato Principia College, kie mi kompreneble havas ĉiutagajn kontaktojn kun la hodiaŭa juna studentaro. Mi interagas multe pli kun gejunuloj ol kun plenaĝuloj, kaj atente sekvas la evoluon de la deziroj kaj intereso de la nuna generacio. En 2016 mi ĉeestis la Kongreson de TEJO en Vroclavo por konatiĝi pli kun la nuntempa junularo en la movado, kaj ankaŭ partoprenis en la informa laboro pri Esperanto al miloj da gejunuloj dum pluvplena semajno ĉe la rokfestivalo Woodstock, ankaŭ en Pollando.

Mi povis prelegi pri pluraj temoj en la Buchanan-seminario en la Universitato de Liverpolo. Mi ĉeestis kongresojn de la Hispana Esperanto-Federacio, kie en Malago mi parolis hispanlingve kun grupo de profesoroj pri Esperanto. Mi partoprenis la Trian Tutmondan Kolokvon pri la Instruado de Esperanto en Svislando, kaj aranĝojn de la Esperantic Studies Foundation (ESF). Pasintjare post la Lisbona UK mi partoprenis kaj prezentis en la Nitobe-simpozio organizita de ESF. En 2017 mi akceptis inviton fari prelegvojaĝon por prezenti al deko da Esperanto-grupoj kaj ankaŭ en publikaj aranĝoj por francaj kaj belgaj esperantistoj, la t.n. "franca turneo". Samjare mi prelegis en Poznan en la Interlingvistika Programo. Kiel universitata profesoro mi faris esplorojn pri la historio de la instruado de Esperanto en kvar bibliotekoj kun Esperanto-kolektoj, kun plejoftaj vizitoj al CDELI kaj la Biblioteko Hodler ĉe UEA, kie por mi estis plezuro povi konatiĝi kun la tre afablaj kaj helpemaj oficistoj, kaj ankaŭ kun vizitantoj al la C.O.

Mi verkis artikolojn anglalingve kaj en Esperanto interalie por JKI, INDECS, kaj IPR (*Internacia Pedagogia Revuo* de ILEI). Mi estas aktiva trejnita ekzamenanto por la KER-ekzamenoj (ĉi-jare en tri apartaj aranĝoj). Mi nun verkas laŭpete por projekto pri lingvoinstruado. Mi partoprenis en studseminario de AIS, kie mi prelegis kvarlingve pri la fenomeno de poliglotoj kaj kion ni povas lerni de ili pri lingvoakirado. Mi ĉeestis poliglotajn konferencojn, renkontiĝojn kaj seminarion por profesie kompreni kaj klarigi al kolegoj en konferencoj, kaj ankaŭ al miaj studentoj, kiel spertaj lingvolernantoj plej efike akiras lingvojn, kaj por helpi pri la disvastigo de Esperanto en tiu medio. Ĝia akceptiĝo inter poliglotoj ŝuldiĝas grandparte al la rapida sukceso kiun spertas lernantoj por aktivigi nian lingvon, kompare kun la multe pli granda ŝarĝo prezentita de aliaj lingvoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Fernando Maia Jr.: Entuziasma laboranto



Kial vi decidis kandidati?

Esti estrarano en UEA spegulas tion, kion mi kredas grava por mia Esperanto-agado: kunlabori en internacia teamo por la celoj de la Asocio, por la Asocio mem, por la Esperanto-movado ĝenerale kaj por la socio. Ja estas por mi tre instige, ke pere de la agado en UEA ni povas porti la valorojn de Esperanto kaj de nia kulturo al malsamaj sociaj grupoj, kontribuante por la homaro laŭ niaj ebloj. Evidente por efike plenumi tion necesas havi bone funkciantan strukturon: tial nepras plu labori por la financa ekvilibro de nia Asocio kaj samtempe ampleksigi ĝian agadaron por pli kaj pli inkluzivi iniciatojn, kies celoj estu plibonigi la homan kondiĉon kaj kiuj rekte helpu la atingojn de programoj kiel la Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj. La fina decido kandidati por la posteno de Prezidanto okazis post aktiva subteno de kolegoj en la nuntempaj Estraro kaj Komitato de UEA kaj inter la aktivularo ĝenerale. Ĉar temas pri homoj, kiujn mi tre admiras pro iliaj sukcesoj kaj kun kiuj mi povis kunlabori ekde mia esperantistiĝo, tia subteno portis al mi sufiĉe da kuraĝo por provi plenumi la komunajn celojn de nia Asocio en tiel grava posteno.

Pri kio vi okupiĝas nuntempe en Esperantujo?

Mi estas ano de la Estraro de UEA, oficiale zorganta pri la fakoj Kongresoj, Kulturo, Afriko kaj Rilatoj kun la Centra Oficejo (CO), sed kunlaboranta pri aliaj fakoj, kiel Ameriko, Donacvarbado kaj Membraro. Ĝis junio mi ankoraŭ estas Financa Direktoro de Brazila Esperanto-Ligo (BEL).

Vi estis alelektita al la Estraro pasintjare. Viaj repondeckampoj estas Afriko, kulturo, kongresoj kaj la Centra Oficejo. Iom maloportune, almenaŭ pri la lastaj du: Lahtio verŝajne estos la plej malgranda eŭropa UK post la dua mondmilito, kaj la CO – almenaŭ laŭ la plano de la nuna prezidanto – estas sur la plej rekta vojo al likvidiĝo. Ĉu vi tamen povus prezenti ion pozitivan pri viaj laborkampoj?

Unue estas erare diri, ke la CO estas sur rekta vojo al likvidiĝo laŭ la plano de la nuna prezidanto: Mark Fettes neniam diris tion. Okazis, ke pro financaj postuloj konataj de ĉiuj estis proponita revizio de kontrakto al la nuntempaj oficistoj, sen tamen intenco malfondi la oficejon. La CO estas tre valora por la nuntempa kaj mi povas diri por la venonta Estraro, se mi estos en ĝi. La 51-a Malferma Tago jam

estas anoncita por la ĉi-jara novembro. Estas ege grave zorge prezenti la situacion por ne ekspluati el falsaj informoj. Cetere, certe eblas prezenti pozitivajn atingojn pri ĉiuj menciitaj agadkampoj. Dum la evoluigoj de la laboroj mi ĉiam provis kunligi la plurajn estrarajn fakojn sub mia respondeco por optimumigi la laboradon. Komencante pri la Rilatoj kun la CO, sciinte, ke la oficistoj opinias, ke ne estas spaco por ke ili prezentu siajn ideojn al la Estraro, tuj post mia estraraniĝo en aŭgusto 2018 mi decidis persone vojaĝi al Eŭropo por i.a. partopreni kaj mem helpi organizi la Malferman Tagon en novembro, profitante la okazon por kunsidi kun ĉiu oficisto, kompreni iliajn atendojn kaj meti min je plena dispono por trakti kun ili pri kiu ajn temo, kio ankoraŭ validas. El tio naskiĝis kelkaj kunlaborebloj, kiujn mi konsideras tre fruktodonaj, ĉefe rilate al la Libroservo kaj al la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS), kio rekte tuŝas du miajn laborkampojn: Kulturo kaj Kongresoj.

Kun la Libroservo ni sukcesis plenumi kelkajn laborojn, kiel la dissendo de libroj pere de la Biblioteka Apogo Bachrich kaj la regula propono (kaj reklamo) de specialaj ofertoj, kiuj portis relative bonajn vendojn (la inaŭguro de la retbutiko de UEA en Facebook ankaŭ aldoniĝas al tiuj klopodoj). Rilate al la KKS, ekde la komenco mi metis min kiel lia kunlaboranto, respektante lian sperton pri la organizado de la Universala Kongreso (UK). Tiel mi povis kun li sekvi ĉiun etapon de la preparlaboroj: ekde la disponigo de la reta aliĝilo ĝis la ankoraŭ kurantaj taskoj. Se oni rigardas la historion, estas normale, ke la aliĝoj al iu UK malkresku post relative sukcesa UK, kio okazas nun inter Lahtio kaj Lisbono. Tial mi metis kiel minimuman celon labori por ke Lahtio superu la markon de Bonaero (706), kio jam okazis. Nun ni plu laboras por altigi la nunan aliĝnombron, sed endas konscii, ke plej gravas, ke la UK ne estu deficitita. Tial ni konstante laboras atente pri la buĝeto, tiel, ke ni povu proponi bonan kongreson kun ekvilibra financa rezulto. Tiu UK ja havos florantan kulturan programon: krom la esperantologia kaj internacia kongresa universitata programeroj fokusitaj pri indiĝenaj lingvoj, menciindas la okazigo de la 70-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA, kiu tre verŝajne prezentos rekordajn rezultojn. Rilate la agadojn pri Afriko, mi listigus la laborojn por la okazigo de la 1-a AKVo (Afrika Kongreso de Virinoj), okazinta en Madagaskaro, la reprenon de la programo Ni Semas, la preparlaborojn por la 7a AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) kaj la komisiadon de Heidi Goes pri Angolo, lando al kiu ŝi ĵus vojaĝis en instrumiso kaj pri kies loka membraro ni laboras.



Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Tuj post la fino de la 9a Azia-Oceania kongreso de Esperanto, la urbo Danang gastigis la partoprenantojn de la 37a Komuna Seminario – tradicia junulara renkontiĝo, laŭvice organizata en Koreio (ekde KS-1 en 1982), Japanio (ekde KS-2 en 1983), Ĉinio (ekde KS-14 en 1995) kaj Vjetnamio (ekde KS-29, 2010). (Foto: So Jinsu)

La naŭa Azia-Oceania kongreso en Danang



KAOEM (Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado), okazigis la 9an Azian-Oceanian Kongreson de Esperanto kun la temo “Esperanto kaj kultura diverseco de Azio kaj Oceanio” la 25-28an de aprilo 2019 en Danang, Vjetnamio.

La kongreson partoprenis 281 personoj el 22 landoj, de la kongresa mondoparto Azio, tra la najbara Oceanio ĝis la malproksimaj Ameriko, Eŭropo, kaj Afriko. Post la plej granda grupo de 87 aliĝintoj el la kongreslando, sekvis 74 koreoj, 47 japanoj, 40 ĉinoj, 7 indonezianoj, 4 nepalanoj, 3 mongoloj, kaj unu aŭ

du personoj el aliaj 15 landoj. Kvankam la ok antaŭaj kongresoj estis Aziaj, la unua kongreso Azia-Oceania konservis la numeradon kaj iĝis la naŭa.

Dum la kongresaj tagoj 18 programeroj estis aranĝitaj. Kongresanoj tage sin dediĉis por lerni kaj praktiki la lingvon kaj por sperti klasajn programerojn. Kaj ili ĝuis gajajn vesperojn per Interkona Vespero, Nacia Vespero kaj Internacia Vespero. Speciale preparita programo estis por komencantoj el la kongreslando, kun kiuj eksterlandaj esperantistoj havis konversacion en la unuaj 30 minutoj de Interkona Vespero, ŝanĝante kunparolantojn post ĉiuj du minutoj. Kaj ili povis reveni hejmen kun la sperto de rekta interparolo kun fremduloj.

Kaj la eksterlandanoj povis esti invititaj du parte al la du invitoj de la instancoj de la kongresurbo kaj de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj (VUAO). Tiel egale por enlandaj kaj eksterlandaj ĉeestantoj la programoj estis realigitaj per la kunlaboro de estraro de KAOEM, LKK, kaj Vjetnama Esperanto-Asocio. Oni restigis ankaŭ memoraĵojn en la urbo. Simbolante kvin kontinentojn, la partoprenantoj plantis kvin arbojn kun nomo “Zamenhof-Arbo”, kiu fariĝis la kvina ZEO (Zamenhof-Esperanto Objekto) en Vjetnamio, por la memoro de la 9a AOK.

La kongresejo situis tre proksime de la marbordo kaj plaĝo, kaj tie oni povis promeni kaj ĝui la naĝadon antaŭ kaj post la programoj. La urbo servis senpagan unutagan ekskurson por ĉiuj kongresanoj. Kaj VUAO donis premion kaj ordenon al la grupo kaj personoj, kiuj kontribuis por la Esperanto-movado de Vjetnamio. KAOEM estis premiita, kaj ok personoj el Koreio, Japanio kaj Vjetnamio ricevis la ordenon “Pro paco, amikeco inter popoloj”.

Kun la okazigo de la kongreso ĉiun trian jaron, landaj reprezentantoj elektas novan estraron kaj decidas sekvontan kongreslandon. Estis proponitaj jenaj: prezidanto: s-ro Nisinaga Atusi el Japanio, vicprezidanto: s-ino Nguyễn Thị Phương Mai el Vjetnamio, kaj 2 sekretarioj: s-ino Oh Soonmo el Koreio kaj s-ino Ilia Sumilfia Dewi el Indonezio (konsiderante du centrojn de la movado: Azio kaj Oceanio, antaŭe estis nur unu sekretario). Kiel la kongreslando de la 10a AOK estas decidita

Koreio, el la du kandidatoj, Koreio kaj Nepalo. La jubilean dekan kongreson en 2022 gastigos la urbo Busan.

En ĉi tiu kongreso ja sentiĝis, ke Azio estas tiel granda, ke ĝi povas okazigi sian kongreson kiel malgrandan Universalan Kongreson, kaj oni sentis, ke azianoj devas pli amikiĝi kun oceanianoj por la vera Azia-Oceania Kongreso. Tio donas kelkajn hejmtaskojn solvendajn.

Post la kongreso VEA kaj urbo Danang povis havi la kroman profiton de la revigliĝo de la Esperanto-movado en la urbo, kaj ili trovis la eblecon instrui nian lingvon en la fremdlingva universitato de la urbo, en kiu 20 volontuloj eklernis Esperanton danke al la subvencio de la urbo, VUAO kaj ĝia filio DUAO en Danang.

Tuj post la kongreso sekvis la 37a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana, Korea kaj Vjetnama Junularoj, kiu ĉiujare okazas alterne en kvar landoj ekde 1982. La junularan seminarion partoprenis 32 personoj el 11 landoj. Azianoj kun oceanianoj kaj aliaj kontinentanoj festis en la tradicia kaj turista urbo Danang fine de aprilo kaj komence de majo 2019 en tre amuza etoso kaj kontento.

Por la fotoj kaj filmetoj pri la kongreso kaj seminario, bonvole spektu la jutubaĵojn kun la serĉvorto "La 9-a Azia-Oceania Kongreso" aŭ "sojinsu1".

So Jinsu

Aziaj, oceaniaj kaj aliaj kongresanoj en Danang (Foto: Gim Inhong)





Margareta Zaleski-Zamenhof en la Triopa Kongreso (Foto: Sylvain Lelarge)

Malago: La triopa kongreso

Finiĝis la Triopa Kongreso de Esperanto – 78a Hispana Kongreso de Esperanto, la 21a Andaluzia kongreso kaj la 71a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEF) – okazintaj komence de majo en Malago. Kaj la novaj organizantoj preparas por 2020 novan Triopan Kongreson de IFEF, Germanio kaj Pollando. Saĝa ideo! Mi deziras ĉion bonan al la nova LKK, kvankam ĉe la nordo la vetero estos malpli varma sed same etosa, pri tio mi konscias kaj deziras.

Ni sukcesis kunigi en Malago ĉirkaŭ 180 homojn el pli ol dudek landoj en alloga konstruaĵo, kun la celo profiti la multajn prelegojn, komunan manĝadon, kaj tiel plu.

Kiel membro de la LKK mi alte taksas nian longan kaj pezan laboron, ĉar ni kunsidis multajn fojojn ĉe oficejoj de la urbodomo, entreprenoj, hoteloj, kaj finfine ni elektis la Diocezan Domon ĉe la Katolika Seminario de Malago, kie ni en bonega etoso ĝuis la komfortajn dormoĉambrojn, salonetojn, salonegojn, terason, puran aeron, ktp. Mankis nenio por okazigi la ambician Triopan Kongreson.

Inter la invititoj kaj prelegantoj elstaris: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de la kreinto de Esperanto; Ilona Koutny, profesoro de Universitato de Poznano; Federico Gobbo, interlingvisto kaj esperantologo; Seán Ó Riain, juristo, diplomato kaj doktoro per tezo pri lingvo-planado; Katalin Kováts, filologo kaj metodologo; Dennis Keefe, usona instruisto, profesoro en Universitato de Nankino (Ĉinio); David

Galadí, fizikisto kaj astrofizikisto; José María Rodríguez, advokato de la Hispana Ŝtata Administracio; Miguel Fernández, verkisto kaj poeto, aŭtoro kaj tradukisto de poemoj kaj noveloj, iniciatinto de la Lirikaj Festoj de HEF kaj “Vivu la Teatro”; Miguel Gutiérrez Adúriz, kemia inĝeniero, aŭtoro de pluraj noveloj kaj de la vortaro Amika k. m. a. Ĉiuj partoprenis la kongreson per prelegoj, teatraĵoj...

Menciado de ĉiuj partoprenantoj igus ĉi raporton enua, kaj mi preferas paroli pri interesaj prezentadoj de artistoj profesiaj kaj amatoraj, komikaj kaj dramaj, amuzaj kaj gloraj kiel la 13-persona grupo “Concerto Málaga”, kies muziko translokigis nin en la ĉielon, aŭ Rocío Alba, malaga kantistino, kiu plenigis la salonon je beleco, dia aromo kaj romantika muziko. Ŝi kantis koplön (poezia kunmetaĵo de kvar versoj oksilabaj, kun rimoj en la paraj versoj kaj sen rimoj en la neparaj) kaj ludis la t. n. “Sevillanas” (populara muzika kunmetaĵo, laŭ alterna ritmo de tri je ok kaj du per ok taktoj, kun kiu ĉi tiu danco estas akompanata).

Pedro Carrillo, diplomito en drama arto, surprizis nin per bela komika spektaklo kun dancado kaj opera kantado. Maria Grazia Barboni, itala kantistino, kantis kaj emociis nin per belaj esperantigitaj mondkonataj kantoj. Ne mankis teatro, ĉar la esperantista aktoro Saša Pilipoviĉ ludis la teatraĵon *Vivo de Galileo* kaj prezentis ciganajn kantojn. La simpatia muzik-paro *Kajto* variigis la etoson per novaj kanzonoj kaj kutimaj ridetoj akompanataj de diversaj muzik-instrumentoj, brile ludataj.

Pri la ekskursoj mi sentas min tre fiera, ĉar unue ni timis, ke ni programis multajn ekskursojn, sed ĉiuj realiĝis kaj ĉiuj sukcesis. Multaj grupoj da homoj ĝuis promenadojn tra Malago, ekskurson al urboj Antekero, Rondo, Granado, Kordovo, Medina Azahara, Zafarraĵo kaj Botanika Parko. Mi dankegas la volontulojn, kiuj helpis nin kaj la respondeculojn de la Dioceza Domo, kiuj ĉiam estis pretaj helpi nin kaj aranĝi ĉion akurate kaj senprobleme.

Por fini mian raporton, mi ne povas forgesi la kernon de la Triopa Kongreso, ĉar la prezidanto de IFEF Rodica Todor proponis al ni ĉi gravan eventon “ĝuste por festi sian jubileon en la sama lando kie ĝi naskiĝis”, kaj la evento iĝis neforgesebla kaj nekomparebla. Mi esperas ke ĉiuj fervojistoj kaj ceteraj geesperantistoj, ĝuos novan kongreson post unu jaro en Germanio.

Ángel Arquillos

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Ilja Gnusarijov prelegas (Foto: Roman Bojšakov)

Lingvotrejnado en Jekaterinburgo: Nove kaj denove

Forkuras en la historion la tagoj de la 4a Lingvotrejnado, pasinta la 1-4an de majo 2019 en Jekaterinburgo. Ĝi estis speciala evento de multaj vidpunktoj.

Diversaj malfacilaĵoj, atakintaj la organizantojn ĉi-foje pli agrese, ol antaŭe, kaŭzis ŝrumpo de la loka teamo. Sed la lingvotrejnado denove floris: la jekaterinburga aktivulino Raja Kudrjavceva sukcesis allogi gvidantojn el aliaj regionoj, kiuj varigis kaj freŝigis la programon. Unuafoje por la lingvonivelaj grupoj B kaj C okazis priliteratura kurso kaj trejnado por prepariĝo al parola parto de KER-ekzameno. Unuafoje al la programo kontribuis la heroo de la sovetia, postsovetia kaj internacia Esperanto-movado Andrej Grigorjevskij kaj la leviĝanta verda stelo Ilja Gnusarijov. Unuafoje ĉiuj partoprenantoj ricevis la bildkarton kun ĉarma erinaco – la simbolo de la aranĝo. Estis ankoraŭ multaj unuafojaj eroj, tamen ne la unuan, sed la kvaran fojon la Lingvotrejnado en Jekaterinburgo pasis tre sukcese kun 43 partoprenantoj.

La programo estis streĉa. Laboris lernogrupoj de tri lingvaj niveloj: A, B kaj C, ĉiu havis sian apartan programon, kun kelkaj komunaj eroj (malfermo, koncerto k. s.).

La programo de la grupo A konsistis ĉefe el lecionoj — de matenmanĝo ĝis tagmanĝo kaj de tagmanĝo ĝis vespermanĝo. Tiujn lecionojn gvidis Andrej Grigorjevskij kaj Tatjana Vŝivceva, kio evidentiĝis esti bona kombino, ĉar ĉiu instruanto havis sian metodon: Andreo dinamik-komunikano, Tatjana gramatikan.

Kun la grupo B laboris ĉefe Olga Ŝiljajeva, kiu preparis varian kreaĵon programon kaj ricevis multajn laŭdojn. Irina Gonĉarova havis tri lecionojn kun emfazo de trejnadado por parola parto de KER-ekzameno (dialogo, monologo kaj aŭdkompreno). Multaj programeroj de Ilja Gnusarjov estis destinitaj por kuna laboro de la grupoj B kaj C.

La grupo C ricevis seshoran kurson de Ilja pri la ses periodoj de Esperanto-literaturo kaj trejnadojn de Irina Gonĉarova pri aŭdkompreno kaj tradukado.

Por la niveloj B kaj C Petro Fedosov kaj Aleksandro Mitin okazigis tri intelektajn ludojn. Ludoj lingvaj (“Ĉapelo” de Petro) kaj psikologiaj (“Homlupoj”) furoris ankaŭ nokte, konkurante kun komuna kantado ĉirkaŭ la magneteca Sergeo Kumkov.

Estis ankaŭ primovadaj programeroj. Olga Ŝiljajeva rakontis pri la ĉina projekto “Teo kaj Amo” kaj okazigis Movadan Horon, kie oni parolis pri siaj planoj ene de Esperantujo. Multajn interesajn proponojn donis Jelena Kuznecova kaj Sergeo Kumkov. Aleksandr Basov rakontis pri MASI-projektoj, kiujn li kunordigas. Temis pri la jutuba filmetaro “Esperanto: la Unua Kanalo”, helpo al la vortaro de Kondratjev kaj la traduk-projekto “Lokalizu”.

En la nemultnombra fermita aktivula kunveno temis pri estonteco de la rusia Esperanto-movado, REU kaj REJM. La kunveno ne celis kaj ne faris iujn decidojn, sed ĝi estis utila sondado de la intencoj kaj inklinoj de la ĉeestantoj, ĉiu el kiuj estas aganta esperantisto kun sia unika movada sperto.

Dum la lasta vespero ni ĝuis komunan koncerton, kiun malfermis Petro Fedosov per deklamado de la Zamenhova poemo, kaj finis la amuza teatraĵo laŭ *Provizo* de Samuil Marŝak, kiun reĝisoris Irina Gonĉarova. Sed la pinto de gajo kaj bonhumorigo estis la kantado de Vadim Solovjov, kiu provokis iujn ridi ĝislarme. La programon kronis busa ekskurso tra la urbo.

Irina Gonĉarova

PER2019: Printempe en Norda Karolino

Imagu, ke estas printempa mateno en la montoj de Norda Karolino (NC). Imagu, ke vi staras sub la portiko de via bienloĝejo en la hela varmeta sunlumo kaj rigardas ĉirkaŭ vi la proksiman arbaron kun junaj folioj brile verdaj. Imagu, ke vi aŭdas, ĉirkaŭ vi, la voĉojn de viaj novaj kaj malnovaj geamikoj. Imagu, ke ili parolas Esperanton. Se vi ĉeestis nian Printempan Esperanto-Renkontiĝon (PER2019), vi ne bezonas imagi tian matenon, vi spertis ĝin la pasintan aprilon en Valle Crucis, NC, Usono.

PER2019 okasis ĉe “The Valle Crucis Conference Center” la lastan aprilan semajnfino. La kosto inkluzivis manĝaĵon kaj loĝejon. Ambaŭ estis bonegaj. Ĉi-jare ni havis dek kvin partoprenantojn. Kune kun gepatroj kaj infanoj ni estis dum la semajnfino unu granda familio. Ni havis la bonan ŝancon havi Tomason Alexander



kiel nian instruiston kaj kunordigestron de la aktivado. Vi povas trovi Tomason ĉe jutubo https://www.youtube.com/channel/UCXnT_KZNsQw-MX8Q8gJQDgw.

Post la vendreda vespermanĝo la programo komenciĝis kun diversaj vortaj ludoj, kiuj helpis al ni interkonatiĝi. Sabate ni laboris kun gramatiko kaj faris aliajn ekzercojn por pliiigi nian lingvokapablon. Ofte ni formis malgrandajn grupojn, kie pli fluaj partoprenantoj helpus la malpli spertajn.

Posttagmeze ni esploris la kamparon. Unu grupo promenis al apuda akvofalo. Alia grupo vojaĝis al "Mystery Hill", amuza vidindaĵo nur 20 kilometrojn for. Aliaj legis (dormetis verŝajne). Ni re-kunvenis unu horon antaŭ la vespermanĝo por lerni pri diversaj iloj komputilaj, kiuj helpas lerni kaj skribi Esperanton. La sabatan vesperon ni ludis tabulludojn, trinkis teon, kaj okupiĝis pri konversaciado.

Dimanĉo estis la lasta tago. Post la matenmanĝo Tomaso respondis al diversaj gramatikaj demandoj kaj ni finis nian sesion kun la ludo "difin-defio". En la ludo Tomaso donis difinojn, kaj ni devis respondi per la vorto, kiu estas taŭga je la difino.

Ĉiuj bonaj aferoj devas finiĝi, do post la dimanĉa tagmanĝo ni ĉiuj adiaŭis kaj vojaĝis for kun la scio, ke ni revenos en 2020. Atentu por informo pri nia venonta PER ĉi tie: <http://esperanto-nc.org/spring-esperanto-meeting/>

Tim Gee

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



La 8an de majo en Berlino kunvenis deko da individuaj membroj de UEA por diskuti la estontecon de UEA surbaze de la sinprezentoj de la kandidatoj por B-komitataneco 2019-22. Vi povas legi iliajn opiniojn en la sekvaj du paĝoj. Kion pensas pri la malfacila situacio de UEA ties membroj en Budapeŝto, Londono, Moskvo, Novjorko, Parizo, Pekino, Romo, Seulo, Tokio, Varsovio, Vieno kaj en aliaj (ĉef)urboj?

Berlinanoj proponas

Unuafoje berlinaj individuaj membroj de UEA kunvenis por ekdiskuti tujan estontecon de UEA okaze de la kandidatiĝoj por B-komitataneco 2019-2022.

Rekonstrui la fidon de la membraro, kreskigi la Asocion, novan profitan vojon sulki. Tiuj estas la celoj, kiujn oni aŭdas de la aktualaj kandidatoj al la komitata baloto. Ĉiuj konsentas, sed malmultas la konkretaj proponoj. Por denove forte engaĝiĝi en la sorto de la Asocio, la membroj atendas pli da detaloj, malpli da sekretoj. Tial decidis grupeto da individuaj membroj de UEA kunveni private la 8an de majo 2019 en Berlino por diskuti la situacion. Ja ne facilis kunvenigi la membrojn, ĉar ne ekzistas procezoj kiuj ebligas kontakti unu la alian, diskuti en rondo de regione aŭ fakinterese selektita membraro.

Tamen respondis al nia alvoko deko da homoj, laŭtakse ĉirkaŭ triono de la berlina membraro, por pli bone konatiĝi kun la profiloj de la diversaj kandidatoj kaj cerbumi ĉiudirekte por renaskiĝo de la tegmenta asocio de la Esperanto-movado. Aperis timoj pri laŭorda disvolviĝo de la baloto konsekvence de la laborredukto en la CO kaj demando, kial virinoj ne emas engaĝiĝi en la Asocio: efektive ĉiuj kandidatoj estas viroj.

Kvankam ĉiuj kandidatoj estas delonge aktivaj en la loka kaj internacia movado, plejmulto de la ĉeestantoj al nia kunveno ne bone aŭ tute ne konis ilin. Kunleginte la memprezentojn en la revuo *Esperanto* ni interŝanĝis opiniojn pri la personeco aŭ vojiro de iu aŭ tiu kandidato, sed kiam ni faris la demandon pri iliaj planoj, la respondo malfacilis. Iu volas “regajni la prestiĝon”, “plifortigi la membraron”, “ĝisdatigi la retejon”, “varbi aktivulojn”, “universaligi la Asocion”, “fortigi la fakan agadon”, “trovi eksterajn monfortojn”, “kulturigi Esperantujon”... Ni ja volas ĉion tion, sed de kie venos la mono kaj la forto por realigi la revojn? Ni konstatis, ke neniu kandidato senvualigas sian programon, kaj ke la ĝenerala koncepto kiu helpas al nova impulso ne estis trovita.

Tamen ni, membroj, ne volas atendi pasive la disfalon de la Asocio, ne volas aŭdi nur pri montranĉoj, sed ni volas vidi horizonton, direkton en kiu la Asocio evoluas. Niavespere aperis grandaj ideoj por adaptigo de la varbado, ekzemple, substrekante la facilan evoluigon de la lingvo al genre neŭtrala lingvo (viro/ino, bovo/virbovo/bovino) aŭ kreante reton de profesiaj servoj kiel tradukado, paralela al la delegita reto, en kiu la laborprenanto povus donaci parton de la pago al UEA. Pri la delegita reto oni multe parolis, ankaŭ sugestis, ke oni modernigu ĝin cele al pli flua interkontakto de esperantistoj aŭ paralele kreu reton de “ambasadoroj de UEA”, kiuj varbu membrojn kaj donacojn kontraŭ makleraĝo.

La nesufiĉe uzita kanalo de subvencioj estis ankaŭ preparolita, pensante ke eble oni devus transdoni la taskon al fakaj ekstermovadaj entreprenoj. Ja nia movado ne estas granda kaj, se enmovade oni ne povas realigi ion necesan – ekzemple, la

novan interretan sistemon – oni ne hezitu sin turni al ekstermovadaj firmaoj, en tiu kazo ekzemple en Barato kie la kompetentecoj estas tre altaj. Sed tio ne signifas, ke UEA ĝis nun ne vere kapablis involvi ĉies kapablojn. Eble oni devus doni pli da reliefo al la novaj aktivuloj, kiuj aperis en la serio de AMO-seminarioj.

Sed la kerno de la restarto troviĝas en la necesa rekapitaligo de la Asocio kaj ni ĉiuj konscias, ke sufiĉos nek la donacoj, nek la subvencioj. Sufiĉe ĝenerala sento estis ankaŭ, ke ni ne plu povas permesi al ni la viv-kostojn de Roterdamo: uzi spacon por la libroservo en kosta urbocentro estas malŝparo de kapitalo. Aperis propono dividi unuflanke la taskojn de la CO, kiuj post ciferigo de la proceduroj ankaŭ postulos sendube teaman spiriton, sed malmultan spacon. Aliflanke krei iun “kulturan fakon” kiu kunigu libro-servon kaj bibliotekon en malmultekosta sed agrabla loko, kie la homoj ĝuos la Esperanto-kulturon, trejniĝos al aktivado kaj se eble ankaŭ iom feriumos. Ekzistas strategioj por memfinanci preskaŭ komplete tian relokigon per subvencioj, sed ne nur. Eble finiĝis la tempo de tradiciaj amas-organizaĵoj kaj komenciĝas tiu de aktivado kun plezuro.

Elisabeth Schwarzer
Pascal Dubourg Glatigny

Ĉu iu aŭskultas?

“Kiom da homoj en la mondo parolas Esperanton?” – multaj demandis dum miaj aktivaj jaroj en la gvidado de la informado por mia landa asocio en la fruaj sepdekaj jaroj. Fine mi trovis decan respondon: “Mi ne scias, sed mi ja scias, ke estas multege pli ol la nombro kiuj aŭskultas la lingvon”. Tiun ĝeneralan trajton mi ja rimarkis en la movado, sed tiutempe mi eĉ ne suspektetis, ke la problemo de neaŭskultado estus tiom profunda kaj minaca kiom mi konstatis jardekojn poste.

“Ni estas movado, kiu diras al la mondo ion, kion la mondo ne volas aŭskulti”, – skribis Renato Corsetti, en sia artikolo “Granda ŝanco: la malnova UEA finiĝadas kaj la nova estas reinventenda” en *La Ondo de Esperanto* (2019, №5). Jes, ĝuste, sed ni estas ankaŭ movado, kiu mem ne volas aŭskulti. Sen kompreni la fundamentan kaŭzon de la malkresko en la membraro de UEA de post 1991 ni ne havas ŝancon solvi la problemon. Jes, ni povas fari urĝan ĥirurgion, sed la paciento fine mortos.

Oni atribuis siatempe la ekon de tiu kolapso al la falo de komunismo, kaj do al la sekva subita falo en membronombroj en ekskomunismaj landoj. Tamen ĝuste same okazis en Britio, kaj ni neniam laŭ mia scio havis komunismon en Britio. En 1993 ekis “financa krizo”, en kiu elspezoj por gajni pli da membroj estis minimumigitaj, kaj en 1994 ekis la Honorofica Sekretario, dirante, ke necesas elspezi monon

por gajni novajn membrojn. Jarojn poste mi trovis leteron lian, en kiu li klarigis, ke li ankaŭ protestis kontraŭ kaŝon de financaj informoj, kaj pri “obstaklado” en la Estraro.

En 2005 mi fine kontrolis la protokolojn kaj la kontojn, kaj konfidence informis la Prezidanton, ke la du ŝajne ne kongruas. Mi sugestis, ke eble la “financa krizo” rezultis ne el ĉiujara perdo de kapitalo, kiel la kasisto dum jaroj asertis, sed la perdado de “libera kapitalo”, do kapitalo ekster specialaj fondusoj. Tute nenion mi menciis pri “kulpo”, kaj nenian akuzon mi faris. Nur post kiam la Prezidanto akuzis min pri paranojo, kaj pintis sorĉistin-ĉasadon kontraŭ min en la jarkunveno de 2006, mi rekalkulis kaj trovis, ke se miaj ciferoj estas ĝustaj, ankaŭ la libera kapitalo kreskadis dum la sama periodo. Nur en 2011 la kasisto konfesis, ke miaj ciferoj estas ĝustaj. Tio signifas, ke ili diris al la membroj malveron pri la kapitalo dum tiu periodo.

Mi produktis ciferojn, mi provizis grafikaĵojn, sed la homoj ne volis aŭskulti. La redaktoro de la periodaĵo volis diri nur “Foriru”, kiam mi provis preparoli la aferon, ĝis fine, nur en 2011, mi sukcesis persvadi al li publikigi mian grafikaĵon.

Ankaŭ grandskale en UEA la membroj ne volis aŭdi. Multaj diris al mi private, ke en la propraj landoj okazas similaj signoj de interna kverelado kaj kolapso de la membronombroj. Ankaŭ en UEA mem okazis simile. Tiu laŭmetoda esplorado, kiun mi raportis, devus esti ege grava al UEA. Mi provis averti ankaŭ pri aliaj similecoj, kiel ekzemple la obstaklado en la Yahoo-grupo “esper-brit” rilate al diskutado pri la asocio kaj la antaŭenigo de Esperanto, avertante pri similecoj kun “uea-membroj”.

Renato Corsetti prave skribis, ke dum la tuta periodo de Lapenna ĝis la komenco de la 1970aj jaroj la asocio ĝuis periodon de kresko, sed ke jam en la 1970aj jaroj, kaj pli klare ekde la komenco de la 1990aj, komencis aperi signoj de ŝanĝiĝo de la mondo kaj de problemoj por idealismaj asocioj. Li pravas, sed li ne mencias la kampanjon “faligi Lapenna” de 1972 ĝis 1974, kiam Lapenna ekŝiĝis. En Britio okazis grandega falo en la membronombroj tiutempe, sed ĝi ekis en 1971, do antaŭ la disputado. Simile la membrufalo, kiu ekis en 1992, anticipis la internan kvereladon kaj ekŝiĝon de ilia Ĝenerala Sekretario en 1994.

La problemoj estas fundamenta. Estas ankaŭ similecoj kun la problemoj de la frua Esperanto-movado, kiam Zamenhof parolis pri la “mokoj de l' homoj”. Se la demando eble ne estu “Kiu kulpas?” Certe ĝi devus esti: “Kion faras tiuj homoj, por ruinigi nian asocion?”. Sed ĉu iu aŭskultas?

Ian Fantom

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



En nia papera epoko ofte okazis, ke en urboj kun Esperanto-grupoj nur unu grupano abonis *La Ondon*, sed pluraj grupanoj legis ĝin. Tiamaniere legis nian gazeton ankaŭ kreemaj kaj ĝojplenaj gejunuloj en la asocio Edukado@Interreto.
(Foto el *La Ondo de Esperanto*, 2013, №12)

Jubileoj kaj memordatoj en junio 2019

2. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Sylla Chaves** (1929-1946-2009), brazila juristo, pedagogo, UN-oficisto k e-isto; prezidanto de Brazila E-Ligo (1978-82), membro de la Akademio de Eo (AdE, 1986-95), honora membro de UEA (1992), aŭtoro de lerniloj k beletraĵoj (*Animo prisma*, 1959; *Por pli bona mondo*, 1970; *Plurnacia bukedo*, 1981; *Karnavalo*, 1981).

5. Antaŭ 55 jaroj naskiĝis **Gonçalo Neves** (1964-1987-), portugala agronomo, tradukisto; e-isto k idisto; membro de AdE (1995-98), aŭtoro de pluraj libroj en Ido k Eo, i.a.: *Kompreni* (1993), *Simptomoj* (2000), *Historia vortaro de Esperanto* (2011), *Recenze* (2018), *Periskope* (2018).

15. Antaŭ 60 jaroj mortis **Kazimierz Bein** (1872-1903-1959), pola okulisto k e-isto, konata kiel Kabe; fonda membro de LK (1905-12), fonda membro k vicprezidanto de AdE (1908-1912), aŭtoro de la klariga vortaro de Eo (1910), elstara E-tradukanto, i.a., de *Elektitaj fabeloj* de fratoj Grimm (1906), *La Faraono* de Prus (1907), *Patroj kaj filoj* de Turgenev (1909) k. m. a. En 1911 ĉesis okupiĝi pri Eo. — Legu pli en NDK, p. 149-150.

16. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Neil Salvesen** (1944-1967-1990), brita historiisto, tekstaj-industria oficisto k e-isto; sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA (1985-88), direktoro de la Centra Oficejo de UEA ekde novembro 1987 ĝis sia morto en marto 1990.

19. Antaŭ 10 jaroj mortis **Dalibor Brozović** (1927-1946-2009), kroata filologo k socia aganto, membro de la Jugoslavio (1986) k Kroatio (1991) sciencaj akademioj, vicprezidanto de la jugoslavia respubliko Kroatio (1990), parlamentano de Kroatio (1992-95); prezidanto de Kroata E-Ligo (1992-2009), prezidanto de LKK de la 86a UK en Zagrebo (2001), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1988). — Legu pli en NDK, p. 46-47.

22. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Pjotr Jevstafjeviĉ Stojan** (1884-1903-1961), ruslandano loĝanta en pluraj landoj, matematikisto, instruisto, verkisto, vortaristo k e-isto, aŭtoro de pluraj lingvoprojektoj; oficisto de la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo (1925-1930), aŭtoro de pluraj vortaroj k aliaj esperantologiaj verkoj, inter kiuj elstaras *Bibliografio de Internacia Lingvo* (1929) k *Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto* (1953). — Legu pli en NDK, p. 267-269.

24. Antaŭ 40 jaroj naskiĝis **Chuck Smith** (1979-2001-), usona komputisto, loĝanta en Germanio, k e-isto; fondinto de la Esperanta Vikipedio (2001), (kun)fondinto de la E-kurso por anglalingvanoj ĉe *Duolingo* (2015) k de la poŝtelefona aplikajo *Amikumu* (2016); la Esperantisto de la jaro 2015.

29. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Nikola Aleksiev** (1909-1924-2002), bulgara ĵurnalisto, socia aganto, vicprezidanto de Bulgaria societo por amikeco k kulturaj ligoj kun eksterlando. La ĉefa gvidanto de la E-movado en la socialisma Bulgario, prezidanto de BEA (1964-76), prezidanto de LKK de UK-48 (Sofio, 1963) k de UK-63 (Varna, 1978), prezidanto de MEM (1963-78), komitatano de UEA (1963-80), aŭtoro de pluraj libroj en/pri Eo. — Legu pli en NDK, p. 13-14.

Aleksander Korĵenkov

La Ondo survoje al №300

La suba teksto baziĝas sur la prelego, prezentita la 6an de junio 2011 en Moskvo kadre de la festkunveno okaze de la duobla jubileo de *La Ondo de Esperanto*: la 20-jara datreveno de la relanĉo de *La Ondo* kaj apero de ĝia 200a numero.

Antaŭhistorio

Aleksandr Saĥarov en *Rememoroj de centprocenta esperantisto* jene priskribis la cirkonstancojn de la naskiĝo de *La Ondo de Esperanto*:

Kiam aperas iu nacia gazeto, ordinare ĝi devas dum unua periodo multe lukti por sia ekzistado. Antaŭ ĉio ĝi estas atakata de aliaj gazetoj, kiuj vidas en ĝi sian rivalon, sian konkuranton. Se tiam ekzistus en Ruslando multaj esperantaj gazetoj, eble ĝin trafus la sama sorto... Bonŝance por *La Ondo de Esperanto* la gazeta afero tiutempe en Ruslando travivis grandan krizon <...> en la jaro 1909 la Ruslandaj esperantistoj restis sen iu ajn Esperanto-rusa organo <...> Tiu konjunkturo estis treege favora por la nova gazeto kaj ĝi baldaŭ okupis tre firman staton.

Saĥarov pravis. Kvankam Esperanto aperis en Ruslanda Imperio, kie loĝis plejmulto da pioniraj esperantistoj, nur 17 jarojn post la naskiĝo de la lingvo en Ruslando estis ricevita permeso eldoni esperantistan gazeton. La gazeton *Esperanto* en 1904 fondis en Peterburgo Ilja Davidoviĉ Ostrovskij, loĝinta en Jalta (Krimeo), kiu redaktis ĝin kun la asisto de la prezidanto de la Peterburga societo *Espero* Aleksandr Isaakoviĉ Asnes.

Post tri kajeroj la gazeto *Esperanto* ĉesis, ĉar Asnes akceptis la redaktorecon en *Ruslanda Esperantisto*, la organo de *Espero*, kiu eldonis ĝin dum tri jaroj kun esperantistaj informoj, beletraĵoj, kaj artikoloj pri aktualaj sociaj problemoj. Ĝuste en *Ruslanda Esperantisto* Zamenhof publikigis sian studon *Dogmoj de Hilelismo*.

En 1908 post apero de la unua numero, *Ruslanda Esperantisto* ekpaŭzis, ĉar Asnes konvinkis la eldonanton de la populara revuo *Vestnik Znaniĵa* (Heroldo de Scio) Vilhelm Vilhelmoviĉ Bitner aperigi suplemente al ĝi ĉiumonatan revuon *Espero* kun paralelaj tekstoj en la rusa kaj en Esperanto. Bitner post unujara eldono rezignis, ĉar esperantistoj apenaŭ helpis la revuon.

Tamen granda estis la propaganda efiko de *Espero*, kiun dum tuta jaro ricevis (sen investo de esperantista kapitalo) preskaŭ cent mil abonantoj de *Vestnik Znaniĵa*. Inter la dekmiloj da legantoj estis centoj da interesiĝantoj pri Esperanto, kaj ili bezonis legi plu en la eklernita lingvo, sed *Ruslanda Esperantisto* ankoraŭ ne reaperis por disponigi al ili tian legaĵon.

La Ondo de Esperanto de Aleksandr Saĥarov

Ĉi tiun favoran konjunkturon komence de 1909 lerte uzis Aleksandr Andrejeviĉ Saĥarov, kiu post sia 15-jara laboro kiel financa oficisto en Ardatov (Simbirska gubernio), forlasis la bone pagatan ŝtatan servon kaj plentempe dediĉis sin al Esperanto.

Jam komence de sia vivo esperantista Saĥarov decidis ekokupiĝi pri eldonado. Saĥarov utiligis sian partoprenon en la 2a kaj 3a Universalaj Kongresoj (1906, 1907) kaj postkongresajn restadojn en Parizo kaj Berlino por spertiĝi pri Esperanto-eldonado, kaj en 1907 li fondis en Moskvo la librejon (vendejon kaj eldonejon) *Esperanto*, ĉe kiu aperis trideko da libroj. Fine de 1908 li ricevis la permeson eldoni la monatan gazeton *La Ondo de Esperanto*.

La unua numero de *La Ondo de Esperanto* aperis en februaro 1909 en la granda formato de tagĵurnalo, en la eldonkvanto 10 mil ekzempleroj. Saĥarov anoncis pri *La Ondo* en Ruslanda gazetaro, sendis ĝin al miloj da konataj adresoj kaj disdonis ĝin al moskvaj gazetvendistoj (nur 20 ekzempleroj estis venditaj).

Zamenhof salutis la novan gazeton:

Kun granda plezuro mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto "La ondo de Esperanto". Dum eĉ plej malgrandaj nacioj havas sian Esperantan organon, la granda ruse-parolanta nacio restis en la lasta tempo tute sen organo; tial la apero de via gazeto, kiu metas finon al tiu stranga kaj bedaŭrinda situacio, sendube estos ĝoje salutita de ĉiuj niaj amikoj. Mi deziras al via gazeto la plej bonan prosperadon; mi esperas, ke via energio kaj persisteco baldaŭ akiros por via gazeto konfidon kaj estimon de la tuta esperantistaro kaj antaŭ ĉio kunlaboradon kaj subtenadon de ĉiuj esperantistoj rusaj.

Ne nur la bonega analizo de la konjunkturo sukcesigis la gazeton. Ĉar ĝi estis lia privata establo, li – malkiel movada instanco – toleris la malprofiton de la gazeto, kiun kovris la profito de la librejo.

Dum la unuaj monatoj... la gazeto estis donanta al ni sufiĉe grandan malprofiton, sed tio nin tute ne maltrankviligis, ĉar ni vidis, ke dank' al ĝi nia klientaro de la librejo rimarkeble kreskis.

Krome, *La Ondo* aperis akurate, ĝi ne incitis legantojn per neologismoj kaj miskompostajoj, nek tuŝis temojn religiajn aŭ politikajn.

Ekde 1910 *La Ondo de Esperanto* estis eldonata ĉiumonate en la pli kutima revua formato, en la eldonkvanto 2 mil ekz. Fine de 1910 Saĥarov dediĉis sin ĉefe al administrado kaj dungis kiel redaktoron la junan juriston Boris Isidoroviĉ Kotzin, bonevon de Zamenhof (pli ĝuste Косын = Коцын, li estis filo de Isidor Косын kaj Teresa Zilbernik, la fratino de Klara Zilbernik).





La rubrikaro de *La Ondo* estis tradicia: “Esperanto en Ruslando”, “Esperanto eksterlande” (en la rusa lingvo), “Bibliografio”, “Diversaĵoj”, “Amuza fako”. Aperis beletraĵoj, felietonoj, artikoloj pri temoj sociaj kaj kulturaj, jaraj revuoj de la Esperanto-movado. La abonantoj jarfine ricevis senpage libron (*Princo Serebrjanij* de Aleksej K. Tolstoj, *Orienta Almanako*, 3a volumo de la plena verkaro de Devjatnin k. a.). En *La Ondo* aperis serio de portretoj de pli ol cent famaj esperantistoj, ruslingvaj ĉefartikoloj.

Tamen en la gazeto sentiĝis opoziciemo al la Peterburgaj gvidantoj de Ruslanda Esperantista Ligo; kvankam Saĥarov ne estis denaska moskvano, li ja loĝis en Moskvo, ĝuis kunlaboron de Moskvaj esperantistoj kaj ne povis leviĝi super la tradicie malvarmaj rilatoj inter la du Ruslandaj ĉefurboj.

Ĝis sia malapero *La Ondo* restis la plej legata Esperanto-revuo en Ruslando, kvankam intertempe kelkaj aliaj gazetoj aperis. La 2a Ruslanda Esperanto-Kongreso (Kievo, aŭgusto 1913) decidis, ke *La Ondo de Esperanto* estu oficiala Ruslanda organo esperantista kun *Pola Esperantisto* por Pollando kaj *Finna Esperantisto* por Finnlando.

Por *La Ondo* verkis Georgij Deŝkin, Vasilij Devjatnin, Andrej Fiŝer, Sergej Obruĉev, Timofej Ŝĉavinskij, Maria Ŝidlovskaja kaj aliaj Ruslandaj esperantistoj. Alilandaj konstantaj kunlaborantoj estis malmultaj.

Dum la Unua Mondmilito ĝi estis unu el nemultaj internaciaj ligiloj inter la esperantistoj. La ŝovinisma haladzo nur en la unuaj militaj monatoj iomete sentiĝis en *La Ondo*, kaj poste pri la milito memorigis ĉefe mortanoncoj pri pereintaj esperantistoj. En la plej lasta *Ondo* (№100-101, aprilo-majo 1917) Kotzin profetis:


La ĵus okazinta revolucio garantios al Esperanto liberan propagandon... La devizo “Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu” necesigas alprenon de lingvo internacia, studebla de ĉiu laboristo.

Sed post la bolŝevista revolucio la privataj sendependaj gazetoj ne povis ekzisti en la kondiĉoj de la “proleta diktaturo”. Ĉesis ankaŭ la “etburĝa” *Ondo*.

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La dua verko en nia ciklo pri dudekjarcentaj rusaj romanoj estas la romano *Peterburgo* de la moskva (!) simbolista poeto kaj prozisto Andrej Belyj, unu el la plej elstaraj figuroj en la Arĝenta Epoko de la rusa literaturo. (Pentraĵo de Leon Bakst, 1905)

Peterburgo, ĉu nekomprenebla, sed bela?

“Nekomprenebla, sed bela”, – per tiu kliŝa esprimo juna siberia esperantistino, kun kiu mi, tiam senlabora kaj senhejma, multe babilis pri ĉio kaj nenio aŭtune 1984, nomis la romanon *Peterburgo* de Boris Bugajev (1880-1934), rusa simbolisto pli konata kiel Andrej Belyj (Белый = Blanka).

Eble ŝi pravis. Malfacile komprenebla ŝajnas ĉi romano, represita en 1981 post jardekoj da forgeso, verkita en 1913 en specialaj cirkonstancoj, per unika lingvaĵo, kun fono filozofia, historia kaj literatura, ligita, interalie, kun ideoj de Kantio, Niĉeo, Steiner kaj Solovjov, kies verkoj apenaŭ konsultebilis en Sovetunio. Sed la ekleganto de *Peterburgo* ne nur ekŝanceliĝas en tiu nebula fono, sed jam en la unuaj paĝoj trovas amason da strangaĵoj, aludoj, devioj kaj eraroj.

Jen la absurda markado en la rekta parolo, foje garnita per misordigo de l' parolantoj: frazon de unu el la dialogantoj povas sekvi en nova linio plia frazo de la unua, sed ne respondo de l' dua, kaj mankas la aŭtora parolo post la dialogeroj por kompenigi, kiu el ili parolas.

Jen oftaj ripetoj: legu la priskribon de Neva Avenuo en la sekvapaĝa prologo.

Jen geografiaj misoj: la senatana domo troviĝas en pli ol unu loko; la vojo de la senatano al la oficejo ne povis pasi laŭ la priskribita itinero; la menciitaj tramoj tiam mankis en Peterburgo. (Belyj konfesas tion post kelkaj alineoj: “Sed unue necesas korekti la enŝteliĝintan mison: pri ĝi kulpas ne la aŭtoro, sed la aŭtora plumo: tiutempe tramoj ankoraŭ ne kuris en la urbo...” Ĉu li mokas la leganton?)

Jen abundo de apenaŭ necesaj sufiksoj kaj “senbezonaĵoj neologismoj” (kia temo por ni esperantistoj!) kaj “Ъстина” elpensita de l' aŭtoro nur por unufoja uzo.

Jen Ŝiŝnarfne/Enfranŝiŝ veninta el la delira menso de Dudkin, eĉ pli absurda ol Nedotikomko en la jam prezentita romano de Sologub, alia simbolista poeto.

Jen mania atribuo de ideoj al koloroj. Kaj eĉ al sonoj: tuj post la fino de la specimena traduko en la originalo sekvas la traktado de l' sonoj и kaj ы.

Jen... Sed eble sufiĉas jenoj pri la “nekomprenebla”, ja la romano estas ankaŭ “bela”. Oni facile trafas sub la ĉarmon de la urbo, ties stratoj, riveroj, insuloj, ĉielo, koloroj. Peterburgo, eĉ pli ol ĉe Gogol kaj Dostojevskij, estas ne nur eventosceno sed ankaŭ protagonisto. Kaj la Kupra Rajdanto de Puŝkin reaperas kaj venas en la hejmon de teroristo – vera literatura frandaĵo!

Mi forgesis diri, ke la romano priskribas epizodon de revolucia teroro de la unua Ruslanda revolucio, pli ĝuste: provokaĵon en la plej okcidenteca urbo de la esence orienteca lando, en Peterburgo, kie kunvivas kaj interbatalas la oriento kaj okcidento, kie homoj estas ombroj kaj ombroj estas homoj...

Laŭ Nabokov *Peterburgo* (kaj *Uliso* de Joyce) estas la plej bona romano de la 20a jarcento. Kurioze, ja por iuj ankaŭ *Uliso* estas nekomprenebla, sed bela.

Aleksander Korĵenkov

Peterburgo

PROLOGO

Viaj generalaj moŝtoj, viaj ŝtatkonsilistaj moŝtoj, viaj nobelaj moŝtoj, civitanoj!

.....
Kio estas nia Rusa Imperio?

Nia Rusa Imperio estas geografia unuo, tio estas: parto de certa planedo. Rusa Imperio entenas: unue – grandan, malgrandan, blankan kaj ruĝan Rusujojn; due – kartvelan, polan, kazanan kaj astraĥanan carlandojn; trie, ĝi entenas... Sed – cetera, cetera, cetera¹.

Nia Rusa Imperio konsistas el multego da urboj: ĉefaj, guberniaj, distriktaĵaj, ordinaraĵaj; kaj plu: – el la unua ĉefurbo kaj la patrino de la rusaj urboj.

La unua ĉefurbo estas Moskvo; kaj la patrino de la rusaj urboj estas Kievo.

Peterburgo, aŭ Sankt-Peterburgo, aŭ Piter (tio estas la samo) reale apartenas al Ruslanda Imperio. Kaj Carurbo, Konstantenurbo (aŭ, alidire, Konstantenopolo) apartenas al ĝi per heredorajto². Kaj pri ĝi ni ne parolos.

Ni parolos nun pri Peterburgo: do – Peterburgo, aŭ Sankt-Peterburgo, aŭ Piter (tio estas la samo). Surbaze de la sama rezonado Neva Avenuo estas peterburga Avenuo.

Neva Avenuo havas mirindan econ: ĝi konsistas el spaco por la cirkulado de la publiko; ĝin limigas numeritaj domoj; la numerado laŭas la ordon de la domoj – kaj pro tio la serĉado de necesa domo estas tre facila. Neva Avenuo, same kiel ĉiu avenuo, estas avenuo publika, nome: avenuo por la cirkulado de la publiko (ne de la aero, ekzemple); la domoj formantaj ĝiajn flankajn limojn estas – hm... jes: por la publiko. Neva Avenuo vespere estas lumigata per elektro. Sed tage Neva Avenuo ne bezonas lumigadon.

Neva Avenuo estas rektalinia (parolante inter ni), ĉar ĝi estas eŭropa avenuo; kaj ĉiu eŭropa avenuo estas ne simpla avenuo, sed (kiel mi jam diris) avenuo eŭropa, ĉar... jes...

Ĉar Neva Avenuo estas rektalinia avenuo.

Neva Avenuo estas nemalgrava avenuo en ĉi tiu nerusa – metropola – urbo. La ceteraj rusaj urboj prezentiĝas nur kiel ligna aro da dometoj.

Kaj Peterburgo mirinde malsamas de ili ĉiuj.

Se vi daŭre asertas la absurdan legendon – ekziston de unu miliono kaj duono da moskvaj loĝantoj – oni devos konfesi, ke la ĉefurbo estas Moskvo, ĉar nur en la

ĉefurbo povas esti unu-kaj-duon-miliona loĝantaro³, kaj en la guberniaj urboj unu-kaj-duon-miliona loĝantaro ne estas, ne estis kaj ne estos. Kaj laŭ ĉi tiu absurda legendo rezultas, ke la ĉefurbo estas ne Peterburgo.

Sed se Peterburgo ne estas la ĉefurbo, Peterburgo ne ekzistas. Nur ŝajnas, ke ĝi ekzistas.⁴

Malgraŭ ĉio, Peterburgo ne nur ŝajnas al ni, sed ĝi ankaŭ estas – sur mapoj: en la formo de du cirkloj, unu ene de la alia, kun nigra punkto en la centro: el ĉi tiu matematika punkto, ne havanta dimensiojn, ĝi energie deklaras, ke ĝi estas: de tie, el ĉi tiu punkto, torentas nuboj da presitaj libroj, el ĉi tiu nevidebla punkto impete rapidas la cirkulero.

LA UNUA ĈAPITRO

**en kiu temas pri certa digna persono, ties mensaj ludoj
kaj pri efemereco de la ekzistado**

*Terura estis la event'...
Pri ĝi tre freŝas rememoro.
Por vi, amikoj, kun volont'
Parolas mi en nuna horo...
Sed tre malĝojos la rakont'.*

A. Puŝkin⁵

APOLONIO APOLLONVIĈ ABLEUĤOV

Apolonio Apollonoviĉ Ableuĥov havis tre respektindan devenon; li havis Adamon kiel sian praulon. Sed ne tio estas la ĉefa, ege pli gravas, ke lia denaske nobla praulo estis Ŝemo mem, la prapatro de la semidaj, ĥesidaj kaj ruĝhaŭtaj popoloj⁶.

Nun ni venu al prauloj de malpli fora epoko.

Tiuj prauloj (ŝajne) loĝis en la kirgiza-kazaĥa hordo⁷, de kie dum la regado de la imperiestrino Anna Ioannovna⁸ aŭdace aliĝis al la servado por Ruslando la praavo de la senatano, murzo Ab-Laj⁹, ricevinta ĉe la kristaniĝo la nomon Andreo kaj la familinomon Uĥov¹⁰. Tiel la Blazonlibro de Ruslanda Imperio¹¹ informas pri ĉi tiu veninto el la sino de l' gento mongola. Poste por koncizeco Ab-Laj-Uĥov estis transformita simple al Ableuĥov.

Oni diras, ke ĉi tiu prapraavo estis la fondinto de ĉi tiu familio.

.

Grizvestita, ore galonita lakeo per delikata kvasto estis foriganta polvon de skribo-tablo; en la malfermita pordo vidiĝis kuirista ĉapo.

– “Vidu, li jam ellitiĝis...”

- “Li frotas sin per kolonja akvo, baldaŭ li bonvenos trinki kafon...”
- “La poŝtisto matene diris, ke al la sinjoro venis letero el Hiŝpanujo – kun Hiŝpanuja poŝtmarko”.
- “Mi atentigas vin: malpli ofte ŝovu vian nazon en la leterojn...”
- “Tio signifas, ke Anna Petrovna...”
- “Kaj do – tio signifas...”
- “Sed mi, nur tiel... Mi tute nenion...”

La kuirista kapo subite malaperis. Apolonio Apollonoviĉ Ableuĥov solene paŝis en sian kabineton.

Krajono, kuŝanta sur la skribotablo, kaptis la atenton de Apolonio Apollonoviĉ. Apolonio Apollonoviĉ akceptis la decidon: doni al la krajona pinto akrecon de l' formo. Li rapide venis al la tablo kaj haste prenis ... paperpremilon, kiun li longe turnadis, profunde meditante, antaŭ kompreni, ke en liaj manoj estas la paperpremo, sed ne la krajono.

Lian distriĝon kaŭzis tio, ke tiumomente lin vizitis grava penso; kaj tuj, en nekonvena tempo, ĝi disvolviĝis al forkuranta pensoĉeno (Apolonio Apollonoviĉ rapidis al la Oficejo). Lia “Ĵurnalo”, aperonta en periodaĵoj la jaron de lia morto, pligrandiĝis je unu plia paĝo.

Apolonio Apollonoviĉ rapide skribis la disvolviĝintan pensoĉenon: skribinte ĉi tiun ĉenon, li pensis: “Tempas iri al la servado”. Kaj li iris al la manĝoĉambro por kafmanĝi.

Sed antaŭe kun speco de malagrabra insistemo li komencis pridemandi la maljunan ĉambriston.

- “Ĉu Nikolao Apollonoviĉ ellitiĝis?”
- “Tute ne, sinjoro: li ankoraŭ ne ellitiĝis...”

Apolonio Apollonoviĉ malkontente frotis sian nazradikon.

- “He... diru: sed kiam – diru – Nikolao Apollonoviĉ, por tiel diri...”
- “Jes, sinjoro, li ellitiĝas malfrue...”
- “Ha, ĉu tiel malfrue?”

Kaj, sen atendi respondon, li rigardis la horloĝon kaj solene iris al sia kafo.

Je la deka horo li, maljunulo, ekveturadas al la Oficejo. Nikolao Apollonoviĉ, junulo, ellitiĝadas post du horoj. Ĉiumatene la senatano informiĝis pri la horo de lia vekigo. Kaj ĉiumatene li paŭtis.

Nikolao Apollonoviĉ estis filo de la senatano.

<...>

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ĉarma amatoraĵo

Ĉiutaga vivo tra la mondo / Redaktis Hori Jasuo, Arase Sajuki. – Maebaŝi: Horizonte, 2018. – 240 p., il.

Mi renkontiĝis kun Hori Jasuo dum la 97a UK en Vjetnamio en 2012, kaj nun mi havas la eblon konatiĝi kun lia libro. Ĝi estas ne malpli ĉarma ol ĝia kreinto, malgraŭ evidenta amatoreco.

La ĉefa avantaĝo de Esperanto estas ebleco rekte kaj egalece komuniki kun homoj tra la tuta mondo. Tio ebligas rekoni la vivon de ordinaraj homoj, iliajn opiniojn, kutimojn, antaŭjuĝojn kaj tradiciojn kaj kompari ilin kun tiuj de sia kulturo. La libro, kompilita kaj redaktita de la japana esperantisto, trafis ĝustan celon.

Fakte temas pri esearo, kreita surbaze de leteroj de diverslandaj esperantistoj, kolektitaj dum pluraj jaroj kaj ordigitaj laŭ 13 temoj: Manĝaĵoj, Vestaĵoj, Domoj, Dorlotbestoj, Sportoj, Lingvoj, Sanigaj terapioj, Hobioj, Malnovaj rakontoj, Festoj, Religioj, Konstitucio pri paco kaj milito, Proverboj. Al la libro kontribuis 23 aŭtoroj, el kiuj du forpasis dum ĝia preparado kaj nomo de la tria (el Belgio) perdiĝis.


En la antaŭparolo la iniciatinto diras, ke li planis eldoni la libron en 2007, sed pro aliaj okupoj ĉiam prokrastis tion kaj nun la 76-jara esperantisto hastas fini tiun gravan taskon, ĉar li ne scias, kiom da tempo li ankoraŭ disponas. Laŭdinda sin dediĉo, dankon.

Do kion ni havas finfine? Unue mi parolu pri la enhavo. Mi mem redaktis plurajn librojn kaj foje magazinojn, kaj mi scias, ke la plej granda defio por la redaktoro estas subigi la buntan enhavon al la unueca redakta politiko. Tiu tasko estas ege malfacila kaj ofte la materialo venkas la redaktoron, trudante al li siajn volon kaj stilon.

La batalo estas komplikega, eĉ se temas pri samlandaj aŭtoroj, sed ĉi-foje la fonto estis verkoj de la aŭtoroj reprezentantaj malsamajn landojn, kulturojn kaj finfine lingvojn, kiuj neeviteble influis iliajn lingvaĵon kaj stilon. Hori Jasuo evidente sentis tion, do li partoprenigis kiel kunredaktoron iun Arase Sajuki. Tamen mi devas konstati malvenkon: la enhavo superis la redaktorojn. Tio sentblas en ĉio – lingvaĵo, stilo, vortouzo. Ili ege varias depende de la aŭtoro. Unueca redakta gvidlinio mankas aŭ almenaŭ ne estas rigore sekvata. Mi donu nur kelkajn ekzemplojn.

La ĉapitron “Vestaĵoj” malfermas la eseo *Áo Dài, la tradicia robo de vjetnamoj*. Nek en la titolo, nek en la teksto renkonteblas klarigo de ĝia prononco, kiu estas ege malsama ol la skribo kaj havis vaste uzatan esperantigon jam en 2012, kiam okazis la menciita kongreso en Hanojo – aŭzajo, uzatan ankaŭ en la respektiva artikolo en Vikipedio <https://eo.wikipedia.org/wiki/A%C5%ADzajo>.

Konfuza estas la uzado de toponimoj. Ekzemple en la eseo *Pri sporto en Ru-*



sio apud “Moskvo” oni renkontas la mirindan miksaĵon de la angla kaj Esperanta formoj “Cheljabinsk”, la pure anglan “Soĉi” kaj la strangan “Kazanĵo”, kvankam ĉiuj tri toponimoj estas delonge esperantigitaj kaj vaste uzataj. La eseo dediĉita al la brazila kuirarto uzas la vorton “kuirarto” majuskle en la titolo, sed minuskle en la teksto ktp. Ankaŭ la lingvonivelo de la aŭtoroj tre varias kaj jen kaj jen renkonteblas eraroj, kiuj kvankam ne tro ĝenas la legadon, tamen iom fuŝas la ĝeneralan impreson.

La ekstera aspekto de la libro estas same amatora. La 240-paĝa eldonaĵo estas presita sur blanka kaj sufiĉe dika papero, ĝi havas glacean kovrilon, la folioj estas forte algluitaj, la tiparo estas granda kaj facile legebla. Tamen ĉio estas aranĝita tre simple, evidente fare de amatora enpaĝigisto. La tiparo estas simplega, la bildoj (ĉiam nigrablankaj) varias en kvalito, foje eĉ rastrumeroj videblas kaj la dezajno ĝenerale aspektas kvazaŭ farita de studentoj, eldonantaj gazeton pri la vivo de sia universitato.

Sur la kovrilo estas bildigitaj poŝtmarkoj el diversaj landoj. Evidente la dezajnististo celis aludi, ke la libro estas verkita surbaze de plurlandaj kontribuoj, sed la rezulto estas maltrafa – ŝajnas ke temas pri filatelieja eldonaĵo. La kovrilo mem estas aranĝita strange – el du malsamkoloraj folioj intergluitaj ĉe la randoj tiel ke la kovrilo duobliĝas kaj pufas surtable kvazaŭ pro malsekeco.

Ĉu mi estas tro kritikema? Espereble ne. Mi nur montris la signojn de la amator-eco, tiom ofta en la Esperanto-kulturo ĝenerale kaj speciale en ĝia eldona fako. La enhavo povas esti bonega (kiel ĉi-foje), sed en la nuna mondo superplena je proponoj, aktive altrudataj de reklamo kaj merkataj trukoj, oni devas memori ke aspekto estas ne malpli grava ol enhavo. Se ni konsideras Esperanton ne amuza ŝatokupo, sed vere serioza lingvo, ni devas uzi ĝin serioze, kun plena respondeco kaj skrupulo. Ne sufiĉas esti sinceraj, necesas esti ankaŭ ambiciaj. Mi esperas ke post rapida elĉerpiĝo de tiu ĉi leginda libro, la iniciatinto preparos la duan eldonon – pli kvalitan kaj zorgeme preparitan. La verko ja meritas tion.

Stanislao Belov

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Kurso sur bonaj reloj

Ĉi-tiuj kulturagantoj trajniĝas en kurso aranĝita de la neregistara organizo *Gara-bide...* (*Etnismo*, N°102, p. 23, “Koncize el...”; trovis Ionel Onet)

Malkonata molkotono

Amikumu disvatiĝas per Esperantujo, do ne estas surprize, ke Esperanto estas populara lernlingvo en Amikumu. (Svend Vendelbo Nielsen: *Lingvaj lernantoj en Amikumu*, <https://kalkulinda.com/2018/03/18/lingvaj-lernantoj-en-amikumu>)

UEA-estraro forte reduktita

En aprilo 2018 sinjoro Huang Yingbao (Trezoro), la estrarano de UEA vizitis nian universitaton... (Pu Songling: *La strangajoj de Liaozhai*, Yanshan, Pekino, 2018; postparolo, p. 438; rimarkis Ionel Onet)

Enketu konvulsie

Kara Francois, BV serĉi en spasmejo... amike, Trezoro. (11 maj 2019, dissendolisto UEA-membroj, trovis Dima Ševĉenko)

Sed homoj kun homoj, komitatanoj kun komitatanoj

Kvankam multaj homoj, komitatanoj, estraranoj kaj volontuloj, sendis siajn bedaŭrojn... (www.liberafolio.org/2019/05/11/duono-de-la-tejo-estraro-ne-plu-aktivas)

Gestolingva polifonio

Clemens J. Setz... prelegis gemanlingve pri la poezio de William Auld... (enkonduko al Clemens J. Setz: *William Auld, la majstro de la malnova monda helpingvo // Beletra Almanako*, 2019, N°33, p. 134, trovis Paweł Fischer-Kotowski)

Harmonia decido

... la Estraro de REU faris decidon pri la dato kaj loko de la vica Konferenco de REU. La koncerta novaĵo kun la protokolo jam aperis en la paĝaro... (REU-agado, 22 apr 2019, rimarkis Kalle Kniivilä kaj Valentin Melnikov)

Alta aritmetiko

Krom duona dudeko da Esperantistoj el Berlin (ĉ. 1 horo per trajno RE 1) kaj la apuda Eisenhüttenstadt alvenis grupoj de Szczecin kaj Zielona Góra. (Roland Schnell: *Ponta festo Frankfurto (Odro)*, <https://esperanto.berlin/ponta-festo-frankfurto-odro/>; malkovris Paweł Fischer-Kotowski)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 77-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>